




BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Adreso: Sofia, poŝtkesto 66



El ĉarma Bulgario

Jen estas antaŭ ni post longa atendo la unuaj numeroj de nia ŝatata organo «Bulgara esperantisto» — presitaj, ilustritaj, belaspektaj. Tio eble pardonigos parte la redakcion pri la troa malfruiĝo. Tiuj monatoj ja estis tempo de streĉa klopodo por akiro de tipografie presata organo. Kaj ni povas gratuli nin pri la venko. La redakcio streĉas siajn fortojn por alĝustigi la aperadon. Jam estas kompostata la 3-4 numeroj kaj ni jam preparas la kvinan—majan, numeron.

Al tiu peno de la redakcio, ni esperas, aliĝos ankaŭ la tuta nia anaro kaj precipe la aktivularo de urboj kaj vilaĝoj. Nia movado ĉiutage kreskas. Konstante aperas novaj societoj, kiuj jam estas pli ol 70 en la lando. Komen-ciĝis la preparoj pri nia 33-a landa kongreso en Varna, kies signoj promesas brilantan kongreson. Niaj fortoj pligrandiĝas kaj tio devas reflektiĝi en nia organo. Ĉiuj devas ĝin propagandi kaj varbi novajn abonantojn.

La gazeto havas pli grandan amplekson kaj do, bezonas pli da kunlaborantoj. En ĉiu societo, en ĉiu urbo kaj vilaĝo devas esti konstanta korespondanto, kiu sciigos pri la organiza vivo, pri la diversflanka agado de la esperantistoj. Jam ni havas eblon presi sufiĉe da literaturaĵojn. La esperanto-verkistoj aktiviĝu! La redakcio volonte akceptos originalajn rakontojn, versojn, skizojn k.a. kiel ankaŭ tradukaĵojn de bulgaraj aŭtoroj. Konsiderante, ke la redakcio ne havas pagatajn oficistojn ni petas niajn kunlaborantojn sendi klare skribitajn manuskriptojn kun grandaj interliniaj intervaloj. Per komunaj fortoj ni ĉiam plibonigu nian karan presorganon, organizanton kaj propagandanton de nia movado.

Antaŭen, gesamideanoj, al novaj venkoj!

33-A BULGARA ESPERANTO-KONGRESO

La 20—22-an de julio k.j. en nia apudmara bela urbo Varna okazos la 33-a bulgara esperanto-kongreso.

Kongresa komitato de 11 membroj, prezidata de s-ano Belĉo Nikolov — rektoro de la universitato en Varna, kaj 12 multnombraj komisionoj pri la diversaj kongresaj aranĝoj aktive laboras por organizi bone kaj modele la kongreson.

Taksante alte la valoron de senpera internacia kontakto de esperantistoj, la Centra komitato de Bulgara esperantista asocio decidis kaj jam invitis 50 reprezentantojn de naciaj esperanto-asocioj, de Centra estraro de UEA k.a. el 39 landoj. La invititaj gastoj ĝuos semajnan restadon en nia lando je kostoj de BEA.

Ni esperas, ke ĉiuj invititaj gastoj akceptos nian inviton kaj partoprenos la kongreson. Aliajn gastojn por la kongreso ni atendas ankoraŭ el pluraj landoj.

La nombro de la delegitoj de ĉiu societo estas proporcia al la nombro de la regulaj societaj membroj dum la lastaj du jaroj. Oni rajtas sendi po unu delegito por ĉiu deko da regulaj membroj kaj por parto de ĝi, sed por ne malpli ol 5 membroj. Regulaj membroj estas konsiderataj ĉiuj, kiuj elŝuldiĝis al la kaso de CK por la tuta jaro. Por 1958 j. oni devas pagi la ko-

lizon al CK ĝis la 15-a de junio k. j.

Novaj societoj, agnoskitaj de CK post junio 1957, elektas delegitojn konforme al la nombro de la anaro nur dum 1958.

Ekzemploj:

1. La societo havis dum 1957 j. 60 membrojn. Je la 15-a de junio 1958 ĝi havas 90 elŝuldigitajn al CK membrojn. La meza nombro estas 75. Do, la societo rajtas sendi al la kongreso 8 delegitojn.

2. La societo havis en 1957 j. 105 membrojn. Ĝis la 15-a de junio elŝuldiĝis al CK nur 64 membroj. La meza nombro estas 84,5. Do, la societo rajtas havi 8 delegitojn.

Ĉiu regula membro de la asocio rajtas esti delegito.

La bulgaraj delegitoj kaj gastoj devas aliĝi laŭeble senprokraste.

La kongreskotizo estas 10 levoj ĝis 1.VI., post 1.VI. ĝis 1.VII. — 15 levoj. Post 1.VII. oni entute ne akceptas aliĝojn.

Pri aliĝiloj oni petu la lokajn esperantosocietojn kaj la lokan kongresan komitaton.

Ĉion por la kongreso adresu al:

33-a Bulgara esperanto-kongreso — Varna.

ORGANIZIVO

FRUKTODONA LABORO

RUSE.— La 7-an de februaro 1958 la loka esperanta societo «Libero» okazigis omaĝe al la 70-a datreveno de la apero de esperanto kaj 50-a datreveno de la fondiĝo de nia batalplena BEA, solenan kunvenon en la nova klubejo, akirita post pluraj kaj energiaj klopodoj, dank' al la bonfavoro de la komunista partio kaj sindona laboro de niaj verdstelanoj L. Dinolov kaj D. Kolarov.

Laŭtagorde oni faris ankaŭ raporton pri la bonprosperanta esperanto-koopero kaj en ligo kun tio oni decidis malfermi esperantan librejon en Ruse, se estas akirebla ejo. Kelkaj samideanoj anoncis sin kooperanoj.

Dum la kunveno oni tuŝis kaj pritraktis multajn aktualajn laŭplane problemojn en konkordo kun la instrukcioj de BEA kaj la lokaj perspektivoj kaj cirkonstancoj.

Estas unuanime decidite jene:

Malfermo de elementa kurso por gecivitanoj la 25-an de februaro 1958 j. kun kursgvidanto D. Ivanov. Pro manko de monrimedoj kaj freŝdataj prikursaj varbiloj, afiŝoj kaj sloganoj la propagando estas malfaciligata. Tiurilate BEA devas provizi la societojn per efikplena kaj freŝdata prikursamaterialo. Solaj lokaj propagandiloj utiligitaj: la loka radiocentro, permanaj pentroafiŝoj kaj la kolonoj de la loka ĵurnalo «Dunavskā pravda».

Jam funkcias kvar elementaj kursoj: 1. Ĉe la elektra teknikumo partoprenas 30 ĝenerantoj. Gvidanto estas la ĝeneranto Kisov, kontrolata de s-no St. Stefanov, profesoro de matematiko. 2. Kurso ĉe konserva kombinato «Dunavia» kun 15 gekursanoj. Gvidanto nia vigla s-no Jordan Kalinov. 3. Kurso por geoficistoj ĉe la prokurejo kun 12 gekursanoj. Kursgvidanto nia diligenta s-no J. Kamburov, prokuroro. 4. Kurso por fervojistoj kun 15 gekursanoj. Kursgvidanto nia senlaca s-no Marin Dimitrov.

Estas planitaj: Vesperamuzfesto en marto. La klubejo estos malfermata ĉiutage. Gazetoj, libroj ĉiutage legeblaj.

VIGLA AGADO DE SOCIETO «V. LEVSKI» — LEVSKIGRAD

La 9-an de marto k. j. okazis la jarkunveno de nia societo. La ĥoro plenumis tre emociigan programon: la esperantistan himnon «La Espero» kaj aliajn esperantajn, rusajn kaj bulgarajn kantojn.

La kunveno estis malfermita de s-no Nenčo Dermengiev per mallonga parolado.

La prezidantaro de la kunveno konsistis el 10 personoj, inter kiuj estis: la prezidanto de la regiona popola soveto, s-no Todor Lesev, reprezentantoj de la regiona komitato de Bulgara komunista partio, de la esperantistaj societoj en la regiono k.a.

La sekretario de la societo s-no Cvetan Cvetkov faris raporton pri la agado de la societo, laŭ kiu la societo dum la pasinta jaro tre plifortiĝis kaj plivastigis sian agadon. Ĉe la fino de la jaro la societo havis 128 regulajn membrojn.

Dank' al la helpo de nia societo estis fonditaj esperanto-societoj en la sekvantaj loĝlokoj: vilaĝoj Rozino, Bogdan, Prolom, Gornidomljan kaj urbo Klisura.

En la librejoj de urbo Levskigrad estis venditaj: 150 lernolibroj de As. Grigorov, 120 de Iv. Sarafov kaj S. Hesapčiev, 100 vortaroj. 18 geesperantistoj de nia societo abonigis alilandajn samideanojn al nia tre bela monata revuo «Nuntempa Bulgario». Nia societo havis 56 abonantojn de la organo de BEA — «Bulgara esperantisto», 27 abonantojn de diversaj alilandaj esperantaj revuoj.

La societo malfermis la sekvantajn kursojn:

1) Gelernanta kurso por komencantoj kun lektoro s-no Lazar Gajdarov. Ĝin partoprenas 15 kursanoj. 2) Gelernanta (Teknika lernejo) kurso por komencantoj — lektoro Hristo Paškulev. Tiun kurson partoprenas 12 kursanoj. 3) Fervoĵista kurso por komencantoj kun lektoroj Al. Ĝerasimov, ĉefo de la stacidomo, s-no Petar Vlasev, kun 12 kursanoj. 4) Geurbana kurso por komencantoj — lektoro s-no Cv. Cvetkov, kun 23 kursanoj. 5) Geurbana kurso por progresintoj, lektoro s-no Cv. Cvetkov, kun 27 gekursanoj. 6) Parolanta rondo — lektoro Cv. Cvetkov.

En la daŭro de la jaro la societo montris tre viglan agadon, dank' al kio ĝi okupis unuan lokon en la konkurado, organizita de la redakcio de «Bulgara esperantisto», kaj ricevis la honorstandardon de CK de BEA kaj librojn.

Fine la kunveno akceptis rezolucion por estonta agado.

N. Dermengiev

POLSKI TRAMBEŜ, regiono de Tirnovo. — En la mezo de januaro k.j. en Tirnovo okazis la jarkunveno de la regiona instruista profesia organizaĵo. La raporto de la gvidantaro menciis la esperantan agadon de la instruistoj en vilaĝo Polski Trambeŝ kaj la prezidanto rekomendis ilian ekzemplon al ĉiuj instruistaj societoj. En la ekspozicio partoprenis ankaŭ bone preparita agitpanelo, enhavanta interinstruistajn leterojn, fotojn ktp., skribitajn en esperanto. Tiamaniere la taŭgeco de esperanto ricevis oficialan agnoskon. La ĉeestanta reprezentanto de la distrikta gazeto «Borba» esprimis pretecon

plincmbrigi la presigon de poresperantaj materialoj.

Hrisman

NOVA SOCIETO EN VELINGRAD

VELINGRAD. — Laŭ iniciativo de la plej aĝa esperantisto Nikola Godev, la 10-an de januaro k. j. en belega kuraĉloka urbo Velingrad 13 entuziasmoplenaj geesperantistoj fondis esperantan societon «Stojo Kalpazanov».

Oni elektis estraron: Dimitar Peŝterski — prezidanto, Nikola Godev — sekretario-kasisto, Georgi Jolov — kulturkleriganto, Todor Vlahov — bibliotekisto, Mara Kolčagova — membro.

Oni elektis ankaŭ kontrolan komisionon: Manol Ĉolev, Atanas Gaĝev kaj Dimitria Guneva.

Sukceson al la nova esperanta societo!

N. Godev

RAJEVO KONARE. — La 7-an de marto k.j. la anoj de la societo «Ruĝa stelo» en vilaĝo Rajevo Konare havis ĝeneralan kunvenon. Ĉeestis novaj kaj malnovaj geesperantistoj el la vilaĝo. Ĉeestis ankaŭ CK-ano Iv. Bataklijev.

La kunveno pritraktis organizajn demandojn. Ĝi komisiis k-dinon Dina Darĝonova saluti la solenan kunvenon de la virinoj, kiu okazis la 8-an de marto k. j.

Poste k-do Iv. Bataklijev parolis kiamaniere devas agi la geesperantistoj en nia vilaĝo por certa kontribuo al la esperanta movado. La parolado de la kara gasto kuraĝigis kaj entuziasmigis la ĉeestantojn.

St. Darĝonov

KAZANLIK. Okaze de la 70-a datreveno de esperanto kaj 50-a datreveno de Bulgara esperantista asocio la esperanto-societo «Roza valo» organizis solenan vesperon kun raporto de la societa prezidanto Dimo Martinov — «70 jaroj de esperanto».

En sia raporto s-no Martinov priskribis la agadon de la societo. Nun ĝi bone laboras kun la loka komitato de la paco. La societo havas vastajn rilatojn kun eksterlando.

Post la raporto estis prezentita literatura kaj muzika programo kun akompano de orkestro.

Todor Jelev

VILAĜO GORNI-DOMLIJAN troviĝas en la orienta parto de Levskigrada regiono. Ĝi kuŝas inter du montetoj. La vilaĝo ne estas granda — ĝi havas ĉirkaŭ 800 loĝantojn. En la pasinteco la esperantistoj estis maloftaĵo, izolaj.

Nun ni povas raportti, ke nia vilaĝo sukcese marŝas antaŭen. Dum la pasinta some-

ro ni renkontis gastojn el fremdaj landoj. Tio multege aktivigis niajn gejunulojn kaj en la aŭtuno de 1957 j. ni fondis esperantan societon, nomitan «Paco».

Ni malfermis esperantan kurson por komencantoj.

Iv. G. Donkov

VILAĜO ROZINO.— La 31-an de januaro ĉi jare la loĝantoj de vilaĝo Rozino — Levskigrada regiono, travivis agrablan okazin-taĵon. Nia vilaĝo estis vizitita de s-no S. Ĥesapĉiev, redaktoro en ŝtata eldonejo «Narodna prosveta», kiu per esperantista interŝanĝo pasintan jaron vizitis fratan Pollandon. Li raportis bulgarlingve pri nova Pollando kaj pri sia vojaĝo tra ĝi. Speciale por la solenaĵo en nian vilaĝon alvenis reprezentantoj el Pollanda ambasadejo en Sofio: la armea ataŝeo generalo Mruz kaj aliaj. La kineja salono en nia vilaĝo estis malgranda por enteni ĉiujn kelkcent aŭskultantojn. Super la scenejo per grandaj literoj estis skribita bela slogano: «Vivu kaj fortikiĝu la amikeco inter la pola kaj la bulgara popoloj». La solenaĵo estis malfermita de pionira ĥoro ĉe nia esperantista societo.

Fine, renkontita kun longdaŭraj aplaŭdoj, k-do gen. Mruz ruslingve parolis pri la pola-bulgara amikeco, pri la konstruado de socialismo en niaj frataj landoj kaj kore dankis al la multnombra publiko pri la granda intereso al Pollando. Li promesis, ke dum la Festo de la rozoj en la komenco de junio k. j. la tuta pola ambasadejo vizitos nian belan Rozan valon kaj nian vilaĝon Rozino.

La lastaj vortoj de nia kara gasto estis postsekvitaj de longdaŭraj kaj entuziasmoplenaj aplaŭdoj.

inĝ. Georgi Arnaudov

EN LA ROZA VALO VIBRAS LA VERDA STELO

Laŭ iniciato de la Levskigrada societo «V. Levski» en urbo Klisura fondiĝis nova esperanto-societo, nomita «Balkana rozo». Laŭ la fondprotokolo estis elektita estraro: prezidanto — Genoveva Prangeva, sekretario — Stanka Lalova kaj kasisto — Petar Kolev Gunev. Fondantaj membroj estis dek gejunuloj. Oni komencis kurson. Al la entuziasmoplenaj gejunuloj ni bondeziras sukceson! En nia historia urbeto Klisura, situanta en la famekonata Roza valo, ekblos esperanta vivo.

Societo «V. Levski» aranĝis la 9-an de marto k. j. regionan konferencon, en kiu estis reprezentitaj niaj ses esperantaj societoj — Levskigrad, vil. Rozino, vil. Pro-

lom, vil. Gorni Domljan kaj urbo Klisura. Je la sama dato okazis ankaŭ nia jarkunveno.

En la fino de januaro k. j. nia urbo estis vizitita de s-no Simeon Ĥesapĉiev, kiu en la nomo de la lektora grupo ĉe la Nacia konsilantaro de Patrolanda fronto faris ses prelegojn en Levskigrad kaj vilaĝoj Prolom, Gorni Domljan, Rozino, Klisura kaj Banja — impresojn de sia vojaĝo en Pollando, kiel gasto de Pollanda esp. kongreso en Gdansk.

Li estis akompanita de reprezentantoj de pollanda ambasadejo — la militista ataŝeo generalo Mruz kaj la korespondanto de la Pola telegrafa agentejo, Miroslav Jakonoviĉ. Post la prelegoj oni prezentis pollandan geografian filmon. Ĉiuj kunvenoj estis organizitaj de nia societo, kune kun la lokaj regionaj komitatoj de Bulgara komunistarta partio kaj de Patrolanda fronto.

En siaj prelegoj s-no S. Ĥesapĉiev faris bonegan propagandon por esperanto, rakontante kiel la polaj geesperantistoj organizis liajn prelegojn pri Bulgario en Pollando, kaj kiel Esperanto povas servi por la proksimiĝo de la du slavaj frataj popoloj. En la kunvenoj parolis ankaŭ la polaj reprezentantoj. La kunvenoj estis amase vizititaj, kaj la ĉeestantoj restis tre kontentaj, dankante al s-no S. Ĥesapĉiev kaj al la pollandanoj. Tiaj prelegoj estas tre utilaj por nia movado.

Cv. Cvetkov

HASKOVO.— Nia societo havis jarkunvenon. Ĝin partoprenis 35 personoj. Raportis la prezidanto s-no Delĉo Haralanov. La societo havas 40 membrojn. Pasintan jaron estis nur 10-12 membroj. Oni elektis novan estraron: prezidanto — Delĉo Haralanov, vicprezidanto — Georgi Martinov, sekretario — Trifon Idakiev k.a. Estis elektita ankaŭ kontrola komisiono. La societo aprobis novan planon por sia estonta agado.

En la urbo funkcias kurso por komencantoj.

G. Idakiev

ĻUKOVIT. En la urbo la 16-an de januaro okazis jarkunveno de esperanta societo «Impeto». En la raporto s-no Dono Ĥristov diris, ke la estraro dormis dum la tuta pasinta jaro. Pro tio la societo ne pagis eĉ sian membrokotizon al BEA. La membroj elektis novan estraron: prezidanto — Dono Ĥristov Vasilev, sekretario — Temenuga Konova, kasistino — Jonka Markova. La nova estraro planis sian laboron. En la urbo funkcias kurso por komencantoj.

Tr. Petrov

PAZARGĤIK.— La 4-an de februaro k. j. la esperanta societo «Radio» en Pazarĝik komencis kurson nur por gimnaziaj geinstruistoj. La kurson gvidas s-no Petko Arnau-dov en la gimnazio «K. Veliĉkov» ĉiumarde post la 18.15 h. Ĝin partoprenis komence 18 personoj, sed nun ilia nombro kreskis je 22.

P. A.

STANKE DIMITROV.— Je 14 km oriente de urbo Stanke Dimitrov troviĝas la ripoz-domo de la Centra konsilantaro de profesiaj unuigoj. Ĝi situas en bela naturna ĉirkaŭaĵo. Sude levas sian staturon Rila-montaro kaj norde Verila-monto.

Dum februaro k. j. mi ripozis en tiu ĉi ripozdomo. Dank' al mia esperanta insigno mi renkontis tri aliajn samlideanojn. Kun la permeso de la ripozejestro ni flirtigis sur unu manĝotablon la esperantan flageton kaj ni interparolis en esperanto.

Nia grupo altiris la atenton de la ceteraj ripozantoj. Rezulte ni varbis kvar gekamaradojn, kiuj komencis lerni la lingvon per nia helpo.

Boris Miĥajlov — urbo Stanke Dimitrov

SOLENA KUNVENO EN PLOVDIV

PLOVDIV.— La loka esp. societo okazigis je la 8-a de decembro 1957 j. solenan kunvenon por celebri la 70-an datrevenon de la apero de la internacia lingvo esperanto. La solenan kunvenon ĉeestis multege da geesperantistoj kaj adeptoj kaj amikoj de la ideo por internacia lingvo. Ĝin ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de la departementa kaj urba komitatoj de Bulgara komunista partio, de departementa kaj urba komitatoj de la Patrolanda fronto, reprezentantoj de la urba konsilantaro, de la urba komitato por defendo de la paco, ĵurnalistoj, kulturaj kaj sociaj agantoj, esperantistoj el la esperanto-societoj en la distrikto kaj aliaj.

Reprezentantoj de la packomitato, de Patrolanda fronto, de ĵurnalistoj kaj aliaj salutis la kunvenon. Estis entuziasme akceptitaj saluttelegramoj al CK de la Bulgara komunista partio, al CK de BEA, al UEA kaj UNESKO.

Iv. Batakiev
At. Šopov

NOVA ZAGORA.— Je 27-a de februaro k. j. la geinstruistoj de Unua gimnazio havis sian regulan proforganizan kunvenon. Okazis prelego je temo «Lingvo, kulto al la fremdaĵoj kaj paco». En la ĉeesto

de ĉiuj geinstruistoj estis pritraktata la problemo pri la internacia lingvo. La pridiskutado estis tre vigla, interesa kaj utila. Rezulte de tio la direktoro kaj la vicedirektoro de la gimnazio proponis, ke oni malfermu en la urbo kurson de esperanto por geinstruistoj.

Laŭ propono de la vicedirektoro de la gimnazio estis decidite adresi ekspozon al la Ministerio de la klerigo kaj la kulturo, en kiu oni insistu pri enkonduko de esperanto kiel fakultativa lernobjekto en la sekvanta jaro. La ekspozo estis subskribita de ĉiuj geinstruistoj.

Laŭ deziro de la geinstruistoj, ĉe la Maŝin-traktora lernejo en Nova Zagora la 19-an de februaro k. j. estis malfermita kurso de esperanto. La kurso estas regule vizitata de 12 geinstruistoj de la sama lernejo. La instruado okazas unufoje semajne, merkrede posttagmeze dum du horoj.

VILAĜO LEŤĈEVO.— En la aŭtuno nia societo reaktiviĝis. Pagis sian membrokotizon 23 membroj. Ni malfermis unu kurson por lernantoj kun 7 gekursanoj de la progimnazio kaj unu kurson por plenaĝaj komencantoj. Ni organizis ankaŭ grupon, en kiu partoprenas dezirantaj perfektigi en esperanto.

Okaze de la 70-a datreveno de la apero de esperanto ni purigis kaj plibeligis la societan klubejon (ni ja disponas pri propran klubejon), preparis agitilon, disgluis sloganojn kaj afiŝojn en la magazenojn kaj la oficejojn de la vilaĝo. Pere de la loka radio-centro estis disaŭdigita prelego pri esperanto.

En la gimnazio de vilaĝo Vladoimirovo estis malfermita kurso por gelernantoj, kiu estas gvidata de la lernanto Ivan Aleksiev Atanasov.

Laŭ nia iniciato la 15-an de decembro 1957 j. en vilaĝo Vladoimirovo estis okazigita kunveno. Prelegis k-do Nikola Kolovski, kiu parolis pri la sukcesoj en la batalo de la disvastigo de esperanto dum ĝia 70-jara ekzistado. Estis fondita gelernanta esperanta societo. Kiel societa estraro estis elektitaj: Ivan Aleksiev — prezidanto, Slavka Ljubenova — sekretariino, Cvetan Kirkov — kasisto. Pri la agado de la societo kaj la funkciado de la kurso zorgos kaj kunhelpos ankaŭ la instruisto Georgi Milanov, kiu lernas esperanton en la koresponda kurso.

En Miĥajlovgrad estas organizita esperanto-grupo kun respondeculo Krum Jonĉev — kontisto en ŝtata ŝparkaso. Oni projektas malfermon de kurso, sed nuntempe mankas lernolibro.

TIRNOVO.— La 2-an de februaro 1958 okazis jarkunveno de la loka esperanto-societo «Lumo». Oni faris raporton pri la agado de la societo dum 1957 j. Dum la agadperiodo 1957—1958 estis malfermitaj kursoj — 2 en fabriakaj entreprenoj, 3 en lernejoj kaj 1 por la geurbanaro kun entute 120 gekursanoj, same 1 kurso por progresintoj.

La nove elektita estraro ellaboris detalan duonjaran planon, en kiu estas inkluditaj interalie tiaj taskoj: 3 tuturbaj klerigaj

kunvenoj, esperantistaj interrenkontiĝoj, ekskursoj, plibonigo de la laboro de la kvalifika kurso, amasigo de la societo, membrigo de la multnombraj malnovaj geesperantistoj, restintaj ekster la societo, kontaktigo kun la amasaj organizaĵoj en la urbo por reciproka kaj kuna agado ka.

Dum la kuranta jaro nia societo okupas la decan pozicion, kiun ĝi havis en la pasinteco.

N. Najdenov

ĈIE, ĈIAMANIERE, KONSTANTE PROPAGANDU!

Kelkaj dekoj da laboristoj, fervojistoj, oficistoj, militistoj k.a. el Tirnovo laboras en Gorna Orjaĥovica. Ĉiun matenon ili veturas per vagonaro de stacio Tirnovo al stacio Gorna Orjaĥovica. Inter ili estas niaj samideanoj Koljo Najdenov kaj Nikola Taškov. Ĉiam ili sidiĝas kune, parolas esperante, legas esperantajn librojn aŭ diverslandajn gazetojn, legas korespondadojn, rigardas fotojn k.c. La vojaĝantoj aŭskultas kaj demandas, kian lingvon ili tiel libere parolas. Niaj samideanoj respondas, ke ili paro-

las esperanton kaj klarigas kio estas esperanto. Tiamaniere ili konigas al la vojaĝantoj nian lingvon, kies nomo estas jam vaste populara en tiu ĉi regiono.

Tiel inter konstantaj vojaĝantoj estas varbitaj komencantoj kaj iuj lernintaj esperanton en la pasinteco renovigis siajn konojn kaj denove aliĝis al niaj vicoj.

Originala kaj postsekvinda propagando, ĉu ne?

K. N.

JUNULARO SUR POSTENO

LA SEKCIO ĈE CK DE BEA

La 31-an de decembro 1957 j. la estraro de la junulara sekcio ĉe BEA kunsidis. Ĝi reorganiziĝis kaj akceptis planon por la agado de la sekcio dum 1958 j. La estraro de la sekcio estas jena: Petko Arnaudov — prezidanto, Nikola Nikolov — organiza sekretario, Julia Staevska — sekretariino, Stojĉo Trendafilov — gvidanto de la propagando, Dobri Dobrev kaj Ĥristo Kukušev — respondeculoj pri la junularaj kursoj, Ceca Stamenova — gvidantino de la «Korespondaservo». En la akceptita plano de la Sekcio estas antaŭviditaj la jenaj taskoj:

1. Organizo de 7-taga seminario por gvidantoj de junularaj grupoj kaj aktivuloj.
2. Eldono de propagandiloj: flugfolioj, afiŝoj, poŝtkartoj, kovertoj, glumarkoj k.c.
3. Eldono de kantaro kun notoj.
4. Kolektoj de materialoj por eldono de lernolibroj konvenaj por junuloj kaj infanoj.
5. Organizoj de junularaj grupoj ĉe ĉiuj societoj, kie estas minimume dek junaj geesperantistoj.
6. Organizo de junulara fakdelegita reto.

MALLONGAJ INFORMOJ

La adreso de la junulara sekcio estas poŝtkesto 44, Sofio. Ĉiujn materialojn rilate ĝin sendu al la supra adreso.

Kiuj havas kantojn en esperanto kun notoj aŭ povos esperantigi kantojn, bonvolu skribi al la sekcio.

Ni petas ĉiujn gesamideanojn, kiuj povas pentri, helpi la junularan sekcion en ĝia peno eldoni propagandmaterialojn konvenaj por junularaj medioj.

Sofiaj gejunuloj, organizitaj en grupo ĉe societo «Maksim Gorkij», regule kunvenas sabate je la 19.30 horo. La estraro de la grupo ellaboris planon de la kunvenoj.

Post plej baldaŭa tempo en urboj Levskigrad kaj Kolarovgrad ĉe la societoj ekfunkcios junularaj grupoj.

La albumo «La Juneco de Bulgario» — eldono de Asocio de la popola junularo, bul. Stambolijski 11, Sofio, vekis grandan intereson pri la vivo de nia junularo, atestita fare de la esperantistoj en eksterlando. Rezultis decido pri eldono de nova simila verko en esperanto.

Por propagando de esperanto inter la junuloj nia sekcio stencilis konvenan referaĵon. La bezonantaj ĝin junularaj sekcioj en la lando bonvolu skribi al ni. Oni tuj ricevos ĝin.

En februaro k. j. nia fervora samideanino Julia Staevska, membro de la estraro de nia sekcio, kaj samideano Filipo Franĉeski, el Padova, Italio, geedziĝis. Al la nova esperanta familio nian gratulon!

La fondita ĉe la sekcio «Koresponda servo» bone funkcias. Kontraŭ unu levo en poŝtmarkoj ni disponigas al vi adresojn de korespondemuloj kaj vian deziron ni presigos en iu esperanto-gazeto.

La junulara sekcio kaj la instruista sekcio ĉe BEA organizos en la aŭtuno ekspozicion de infanaj desegnaĵoj el al tuta mondo. Ni ankaŭ sendos reciproke al eksterlando desegnaĵojn de bulgaraj infanoj. Geinstruistoj kaj gepatroj, helpu sindone la bezonatajn desegnaĵojn. Sur la dorso de la desegnaĵo nepre indiku la nomon, sekson

kaj aĝon de la desegnanto. Ĉion sendu al: Junulara sekcio, poŝtkesto 44, Sofio.

En preparo estas kantaro titolita «Junularo kantas». Se vi povas pruntedoni al ni notitajn kantojn en esperanto, ni estos tre dankemaj. La kantaro aperos en majo. Mendu ĝin per poŝtkarto, por ke ni fiksu la kvanton de ĝia eldono.

Gejunuloj, pri via esperanto-aktiveco bonvolu sendi informojn al ĵurnalo «Narodna Mladej», bul. Lenin 47, Sofio. La ĵurnalo presigas ankaŭ konvenajn materialojn ricevitajn per esperanto. Leginte ion pri esperanto sur la paĝoj de la sama gazeto, esprimu vian dankon al la redakcio. La alveno de pluraj leteroj instigos la redaktorojn presigi tiajn materialojn, eĉ organizi konstantan rubrikon, simile al la rubriko en gazeto «Literaturen Front».

Je la fino de 1957 en Moskvo estis fondita junulara esperanto-grupo «Fajrero». La junaj geesperantistoj en Leningrado sekvis la ekzemplon de siaj gesamideanoj en Moskvo kaj fondis grupon «Aŭroro».

LITERATURAJ PAGĜOJ

LA APOSTOLO EN DANGERO

de IVAN VAZOV

Sur la loko, kie nun belas la princpalaco, en 1871 jaro staris la malnova Valikonako (la gubernatorejo) kun siaj malbelaj kunpremitaj domoj, kun malrektaj muroj kaj malnovaj galerioj-koridoroj, rigardantaj al la mallarĝa ŝtonpavimita korto. Okcidente troviĝis ĝia lignopordego, kie postenadis du ĝendarmoj. Maldekstre leviĝis moskeo, kaj dekstre verdis granda saliko kun pendantaj ĝis la tero branĉoj. Ĝi sola ĝuigis la okulojn.

En bela junia tago de la sama jaro, el la gubernatoreja pordego grupe eliris kelkaj turkaj ĝendarmoj, haltis sur la tiea placo, flustris interparolis iom da tempo kaj poste disiĝis diversflanken.

Unu el ili, la konata turko Ali-ĉauŝ — brunhaŭta barbulo, kun kruda kaj pufa vizaĝo — ekmarŝis sur la bazarstrato (la nuna Komerca strato), faris al si vojon meze de la bruanta pasantaro, kiu svarmis sur la mallarĝa strato, borderata de vicoj da malaltaj spicvendejoj kaj butikoj. Li esplore rigardis ĝin kaj ankaŭ ĝian drinkejon, ekpalpis aŭtomate sian revolveron, kvazaŭ por konvinkiĝi, ke ĝi estas en sia loko en la ingo kaj direktis sin por enfiri

en la gastejon. En la sama momento, venante renkonte al li, aperis unu zaptie'o (turka ĝendarmo). Ali-ĉauŝ haltis ĉe la gasteja pordego kaj ĝisatendis lin.

— Kion vi eksciis? — li demandis lin mallaŭte.

— Mi trarigardis, sed tian homon mi ne trovis — respondis la zaptie'o, viŝante per naktuko sian ŝvitantan razitan nukon.

— Ĉu vi bone trarigardis? Ĉu vi bone primemoris? Ĉirkaŭ dudekkvin-jara, blondhara, grizokula, malgrasa, mezstatura homo, vestita en nigra jakto. Iru trarigardi la alian gastejon! Pleje observu la okulojn: grizaj, tre grizaj — instrue parolis Ali-ĉauŝ, kaj liaj okuloj vigle observis la pasantojn kaj rimarkis kiu preterpasis la gastejon kaj kiu eniris en ĝin.

— Mi komprenis, Ali-ĉauŝ! — kaj la zaptie'o foriris.

*

Tiu interparolo de ambaŭ zaptie'oj koncernis Vasil Levski, kiun oni serĉis por aresti.

Tiutempe la sentima apostolo estis veninta el Plovdiv en Sofion, kun la preteksto, ke li estas lankomercisto. Tiamaniere li sekrete organizis la komitaton, kiu pli malfrue fa-

riĝis historie fama per la prirabo de la turka ŝtatrezoro ĉe la montrapesejo Araba-konak. La tuta polico en Plovdiv estis alarmita. Aroj da zaptie'oj embuskis por kapti la apostolon. Ali-ĉauŝ, la plej agema kaj sagaca el ili ĉiuj, gvidis la traserĉadon jam de kelkaj tagoj kaj donis la necesajn instrukciojn al la policianoj, plej detale priskribante la vizaĝon kaj la veston de la revoluciulo.

Do, la diakono Levski troviĝis en granda danĝero. Ĉiam aŭdaca kaj senprudente kuraĝa, konvinkiĝinte pri la malkapablo de la turka polico, memfida, eble kredanta al sia stelo, eble pro tio, ke ĝis nun multfoje li lerte eskapis el la ungegoj de siaj malamiko, li eĉ ne suspektis, ke oni postflaris lin, kaj nek liaj amikoj en la urbo sciis tion por doni al li pli sekuran rifuĝejon.

La akraj rigardoj de Ali-ĉauŝ esloreme sin fiksis ankaŭ al la kafejo de Ilĉo, kiu staris kvazaŭ algluiĝinta al la drinkejo de Trajkoviĉ, kaj li eniris ĝin antaŭ ol eniri en la gastejon.

En la kafejo estis kvar personoj: unu kliento — bulgaro, grandkorpa, dika, en francmoda kostumo, — kiu fumis per nargileo, kaj sur la benko — Ilĉo, la kafejmaŝtro, kiu akriĝis razilon sur la glatigilo, kaj antaŭ la spegulo — lia novico razis klienton kun blonda hararo kaj nigra jaketo el kamlot. La kliento estis dorsturnita al la pordo.

Li estis Vasil Levski.

Ali-ĉauŝ salutis la bulgaron kun la nargileo, kiu estis lia konato. Poste li iris al la kafejmaŝtro kaj demandis lin kun ŝajne indifera mieno, sed mallaŭte:

— Ilĉo, ĉu tie ĉi en la gastejo ne estas iu... komercisto? — kaj la turko priskribis la vizaĝon kaj la kostumon de la diakono.

— Mi ne scias, Ali-ĉauŝ, mi ne interesiĝas pri la gastejo — respondis la kafejmaŝtro daŭrigante sian okupon trankvile, ĉar li ne konis Levski, nek li interesiĝis kompreni kial Ali-ĉauŝ serĉas tian homon.

— Grizokula, malgrasa... — ripetis Ali-ĉauŝ, aŭtomate ĵetante rigardon al Levski, de kiu li povis vidi nur la dorson.

Tiuj vortoj, diritaj mallaŭte, estis tamen aŭditaj ankaŭ de la aliaj ĉeestantoj en la kafejo. La mano de la novico ekstremitis, la razilo de li tenata komencis skuiĝi kvazaŭ falonte. Lia vizaĝo paliĝis pro timo. La malfeliĉa knabo sciis, ke li razas Levski.

Sed ankoraŭ pli ŝanĝiĝis la mieno de la grandkorpa bulgaro, kiu sur la benko suĉis fumon el la nargileo. Li paliĝis kiel blanka tolo. Tio estis sinjoro Hristo Kovaĉev, amiko de Levski, kaj nun li vidis, ke la diakono estas perdita.

La vizaĝo de Levski, kiu estis reflektata en la spegulo, restis kvietaj kaj trankvilaj. Nek unu vejno sur ĝi ekstremitis, nek ia ajn emocio trakuris lian glacian fizionomion. Tio necesa, superhoma sinrego ne forlasis lin eĉ en la plej teruraj danĝeroj, per kiuj estis semita lia nekredbla, aventuroplena vivo.

Ali-ĉauŝ sidiĝis sur la benkon kaj ekbruligis cigaredon.

— Kiel vi fartas, Hristo Efendi? Ĉu vi estis malsana? — Ali-ĉauŝ demandis la sofianon, ĵetinte rigardon al lia pala kaj malsaneca vizaĝo.

— Ba... Ali-ĉauŝ... Jes... Ne! — tio estas pro la varmego... — elbalbutis la konsternita Kovaĉev.

— Knabo! Tenu bone la razilon, ĉar vi tranĉvundos min! — Levski severe riproĉis la knabon.

La turko nevole sin turnis al la nigra jaketo de la apostolo kaj poste komencis interparoli kun Kovaĉev pri bagatelajoj.

«Tiu diablo atendas, ke oni finu la razadon por vidi la vizaĝon de la diakono... Ha! li estas perdita!» rezonis Kovaĉev. Sed en tiu kriza minuto la ekzemplo de malvarmsango de la diakono kuraĝigis ankaŭ lin kaj inspiro venis al li: li rememoris, ke Ali-ĉauŝ havas malgrandan pasion: li ŝatis drinki...

Li invitis lin:

— Unu glason da brando ĉu vi ne trinkus, Ali-ĉauŝ?

La turko konsentis.

Per unu tiro li eltrinkis la okdek gramojn da brando kaj ekŝmacis per siaj malsekaj lipoj. Liaj okuloj ekbrilis kaj per kapgesto li respondis al la saluto de Kovaĉev.

— En varmego vetero la brando refreŝigas la korpon, — denove rimarkigis Kovaĉev — ĉu vi ne bonvolus trinki ankoraŭ? Kaj ne plu atendente respondon, li mendis aliajn okdek gramojn. La turko ankaŭ ilin eltrinkis, kaj ekgargaris brue sian buŝon per akvo.

Por deflankigi plene lian atenton, Kovaĉev komencis mallaŭte kaj kun ruza rideto rakonti ian voluptoplenan historion pri iu loĝantino de Sofio, vestita en pufpantalono kaj konata per siaj leĝeraj moroj. La okuloj de la voluptama turko iĝis humidaj kaj li eltrinkis ankoraŭ unu cent-kvindek-graman glason da brando, ne farante ian grimacon.

«Nun ja estas oportuna momento, ke li forvaporigu nerimarkite», pensis Kovaĉev, ĵetante rapidan signifoplenan rigardon al Levski, kiu ĵus estis leviĝinta de sia seĝo kaj alĝustigis sian kravateton kontraŭ la spegulo.

Sed terurite li vidis, ke Levski, anstataŭ ŝteliĝi senbrue, turnis sin vid-al vide kontraŭ la turko, manbroŝante sian veston kaj komencis pagi al la knabo. Ali-ĉauŝ nevole sin turnis kaj ĵetis rigardon al li. La grizaj,

klaraj, trankvilaj okuloj de la apostolo kontraŭrenkontis la okulojn de Ali-ĉauŝ.

La hararo de Kovaĉev hirtiĝis pro teruro. Sed li tuj sin ekregis.

— Je via sano! — li ĝentile salutis Ĥevski, laŭ la kutimo.

— Je via sano, sinjoro! — salutis lin ankaŭ Ali-ĉauŝ malatente, geste tuŝante per mano sian buŝon kaj frunton. Poste li denove sin turnis al sia interparolanto kaj aŭskultis plue la rakonton.

Levski eliris.

Post duonhoro Ali-ĉauŝ rememoris pri sia misio, adiaŭis Kovaĉev kaj eniris en la gastejon por daŭrigi sian traserĉadon kaj observi la vizaĝojn de la gastoj.

En la sama momento tri zaptie'oj kun aspekto de venkintoj eskortis kun bajonetoj, direktitaj al iliaj dorsoj, kvin timigitajn bulgarojn, kaptitajn en diversaj gastejoj.

Ĉiuj kvin arestitoj estis blondharaj kaj vestitaj en nigraj jakoj.

Ekstarante antaŭ la pordo de la kafejo de Ilĉo, Kovaĉev rigardis konfuzite la viktimojn de la turka stulteco.

Samtempe iu ĉifona ŝopo (vilaĝano el Sofia regiono) preterpasis, kondukante ĉevalon, ŝarĝitan per sakoj da lignokarbo.

— Ĉu vi ne deziras aĉeti mian karbon, he? Jen mi vendos ĝin al vi malkare! — ekkriis la ŝopo.

Kovaĉev ekrigardis lin kaj kvazaŭ ŝtoniĝis:

— Ĥevski! — ekkriis li, kaj ĉirkaŭrigardis timigite.

— Mi ne postulas altan prezon... Vi ne deziras?... Estu volo via, sinjoro!

Kaj la ŝopo malrapide ekkondukis antaŭen sian ĉevalon...

Tradukis: Simeon Simeonov

A. Puŝkin

BIRDO

Mi en fremdlando ne forgesas,
kutimon hejman de l' pratemp':
el kaĝo birdon forpermesis
en luma festo de printemp'.

Kaj la konsolon mi retrovas:
pri kio plendas mi al di',
se al birdeto almenaŭ povas
donaci liberecon mi.

1823

M. Lermontov

NUBOJ

Nuboj ĉielaj, eternaj pilgrimoj,
ĉeno da perloj, rapidas vi alte
al la sudlando, de l' nordo intima
kune kun mi en ekzilon senhalte.
Kio vin pelas? Ĉu sort' senapela,
ĉu de amikoj malica envio?
Aŭ sur vin pezas la krimo kruela,
eble vin pelas la fam' kalumnia?
Ne, — sed vin tedis la kampoj
mizeraj...

Ĝojas neniam, neniam vi tristas,
ĉiam malvarmaj kaj ĉiam liberaj;
hejm' kaj ekzilo por vi ne ekzistas.
1840

F. Tjutĉev

Post ardanta tag' somera
la sufoka nokt' radiis
super la malluma tero, —
de l' streĉeco plena sfero,
en fulmado konvulsiis.

Kvazaŭ en la firmamento
levas sin palpebro peza,
kaj malkovras por momento
la pupil' de l' elemento
la misteron de l' genezo.

A. Fet

PAPILIO

Mi ĉarma estas nur per la konturo
de la figur',

kaj tuta mia brilo kaj veluro —
flugiloj nur.

De kie mi? — ekscii mi deziras,
kaj kien nun?

Sur floron jen sidiĝis mi kaj spiras
sub varma sun'.

Ĉu longe mi sen cel', sen streĉo pendos
sur bela flor'?

Jen tuj flugilojn tremajn disetendos
kaj flugos for.

1885

Rimarko: La kvar versaĵoj de la rusaj poetoj-klasikuloj estas tradukitaj de la soveta ŝamideano I. B. Ĥubjanovskij el urbo Gorkij.

Jen la arbo ĉe mia fenestro sin ŝanĝis —
 en ĉi tiu nokt' alno ĝi estas novjara:
 al ĝi steloj arĝentajn ornamojn aranĝis
 kaj la luno ekrajdis la supron branĉaran.

Sur la vojo briletas dustrio glacia
 kaj vidonte ĝin morgaŭ ĝojkrios knabeto:
 «Signo jen de cerva glitveturil' ĉi tie!
 Ĉu vi aŭdis meznokte sonoran tinteton?»

Aŭdis mi. Dum ĉi-nokt' mi kapablas eĉ aŭdi:
 en arbaro la neĝon de branĉoj falantan,
 de la ruĝaj vulpinoj la varman spiradon
 kaj glacian torenton en bord' sin puŝantan.

Aŭdas mi ankaŭ ĝermon de semoj en grundo,
 hundobojon en foraj loĝlokoj kampulaj
 kaj ĉevalan spiregon ĉe fojno abunda,
 sur fraŭlina fenestro frapeton junulan...

La sonoro kaj voĉo ĉi-nokte ne mortas,
 sed forflugas simile al kanto aŭ trilo:
 en turbinoj sin ĵetas la akvo kun forto,
 bolas fer' kaj per kri' naskiĝas ies filo...

Ĝisaŭrore mi viglos aŭdonte ĉi-foje
 la sonoron sur blanka ŝoseo senbrua...
 Miaj neĝokovrita teren' kaj festĝojo!
 Ke la nokto finiĝu!

Tag' venas unua.

Elbulgarigis: Canko Murgin

Iv. Kolarov

VI ESTOS VIVA!

Jen antaŭ vi ho, Buhired Ĝamila,
 ekstaras rusta krad' de l' ĉelfenestro,
 sed gardobservas vin okuloj miloj:
 kaj vi ja viva estos!

Nun rampas de la gilotin' la morto
 al pura kaj belega ko'lo via —
 sed levas sin de l' mond' la pugno forta:
 jes, estos vi ja viva!

Kaj vian koron kun sang' — juna vino,
 nun enterigi malamik' deziras,
 sed eĥas de Danubo ĝis Pekino:
 ho, vi ja estos viva!

En Alĝerio — per la bataliloj
 al libereco paŝas fratoj miloj —
 ekbrilos ĝi, ho Buhired Ĝamila,
 kaj vi ja estos viva!

Tradukis: S.

Dum 1923-25 jaroj mi loĝis en urbo Varna kaj mi konis ĉiujn enurbajn geesperantistojn. Dum tiuj jaroj ni ĉiuj prezentis belegan esperantistan kolektivon. Ni vivis amike, laboris rezulte por la esperanto-movado, amuziĝis vespere kaj organizadis interesajn ekskursojn dimanĉe. En nia rondo regis tre vigla ideo kaj kamaradeĉa vivo, kiu entuziasmigis ĉiujn kaj subtenis ĉe ni serenajn kaj gajan bonhumoron.

En Varna — apudmara urbo — venadis ofte fremdaj esperantistoj. Dum ne tre longa tempo post ilia alveno, ni eltrovadis ilin diversloken kaj informadis ilin pri la vidindaĵoj de Varna.

Per ili ja ni faris efikan propagandon inter la nova geesperantistaro kaj evidente montris al la novuloj kiel per kelkmonata lernado de la lingvo, ili jam povas paroli kaj interkompreniĝi kun homoj de plej malproksimaj partoj de la mondo. Tiamaniere ni propagandis esperanton ankaŭ inter tiuj, kiuj nenion estis aŭdintaj pri ĝi. Samideano Ivanov el Provadia kaj samideano Gagov el Doŭlen ĉiflik bone rememoras la agrablajn momentojn de similaj renkontoj.

Sed iam okazis intertempoj. En Varna ne ĉiam (ordinare vintre) gastis fremdaj esperantistoj. Dum similaj intertempoj antaŭ la venintaj el la provinco bulgaraj samideanoj ni, petante pardonon, levis ŝultrojn kaj konsilis ilin: estu trankvila, kara, nun estas malŝanco, sed baldaŭ nepre venos fremduloj kaj ni konatigos vin... Sed la fremduloj malfeliĉe ne venis baldaŭ. Tiam ni agis ruze. Iu el ni komencis ludi la rolon de fremdulo. Tiu «iu» plej ofte estis mi, ĉar mia fizionomio estas iomete pli stranga ol la ceteraj kaj miaj vestaĵoj iomete pli elegantaj. Tiamaniere mi kelkfoje prezentis antaŭ la scivolemaj bulgaraj esperantistoj la «alvenintajn» en Varna esperantistojn el alilando.

Iufoje en Varna venis bulgara esperantisto el urbo Preslav kies nomo estis Todor Stojanov. Li insiste volis interkonatiĝi kun

fremda esperantisto. Kelkaj ŝercemuloj tuj informis lin: «O! Vi estas feliĉa homo! Hodiaŭ ĵus estas alveninta el Estonio bonega esperantisto. Ĉi vespere ni havas renkonton kun li en la marĝardeno, nepre venu.»

Sciante la ŝercon, mi atendis la kompanion ĉe tablo en la kazino. Okazis amikeca «interkonatiĝo». Mi prezentiĝis kiel estono Ilmar Kuzar. Kamarado Stojanov triumfis... Komenciĝis longaj rakontoj pri «mia» lando, kaj pri esperanto-movado ĉe ni. Mi demandis pri la movado en Bulgario. Stojanov de tempo al tempo mensogis min pri iaj faktoj, kiujn mi bone konis, sed mi kaŝe pardonis lin, ĉar miaj sciigoj pri Estonio estis entute elpensitaj. La vero estis, ke mi nek estis vizitinta tiun landon, nek estis leginta ion pri ĝi. Tiuj interesaj renkontiĝoj inter la bulgara samideano el Preslav kaj la «estona» samideano daŭris sufiĉe longe. Iun tagon li volis havi adreson de iu bela estonino. Jen la konfuzo! Finita la komedio! supozis mi. Sed tuj mi rememoris, ke nia kamarado Georgi Sapunĝiev ricevis estonan esperanto-gazeton kaj havis multajn korespondantojn el Estonio. Mi prenis de li la gazeton kaj tuj reskribis la unuan trovitan tie virinan adreson. Ĉu ŝi estis fraŭlino aŭ sinjorino mi ne sciis. Ĉu ŝi estis blonda aŭ bruneta mi ankaŭ ne sciis. Tamen mi tre fiere kaj ĝoje donis la adreson al Stojanov.

Komenciĝis tre riĉa korespondado plena je sentoj, amo kaj promesoj. Fine geedziĝo. La estonino nun loĝas en Preslav kaj ambau kun Todor Stojanov ĝojas je bela filino.

Karaj rememoroj... Mi finfine ja estis senmaskigita. Kiel rememoro restis ankaŭ la fakto, ke al Todor Stojanov oni aldonis trian nomon — «la estono», kiel ni ĝis nun lin nomas.

Jen, vidu, la ŝerco faris pli bonan aferon ol la oficiala interkonatiĝo kaj kunigis du internaciajn korojn.

Baj Stojan

LA KANTO DE IRINO (el la fabelo pri la tri fratinoj)

Nubo nigra, malfidela,
ŝtorme plena je malic',
nun al kiu homo bela
suferegojn, suferegojn portas vi?
Kaŝa angor' nekonata,
en la koro kuŝas vi!
Sed ĝis kiam, malbenata,
min subpremos, min subpremos vi?
Suno brila kaj belega,

kie estas via fort'?
Vi rapidu, ardoplena,
nigrajn nubojn, nigrajn nubojn
pelu for!

Kie estas vi, ho ĝojo,
kiun celas mia vol'?
Ĝoj' revata eĉ en sonĝo,
mi atendas, vin atendas sen konsol'!

El la bulgara: Petko Arnaudov

KVAR FABLOJ

de V. GR. SPROSTRANOV

BARKO KAJ REMILO

Sur la glata supraĵo de la rivero trankvile naĝis la malgranda barko. Iun tagon la barko rigardis ironie la remilon kaj diris fierege:

— Kial vi iras ĉiam kun mi? ... Mi transportas homojn, varojn kaj diversajn produktojn, sed vi? ... Kion vi faras? ... Vi trenas vin tage kaj nokte post mi kaj de vi estas neniam utilo! ...

La remilo respondis modeste:

— Sen mi vi ne povas fari eĉ unu paŝon. Se mi ne estas kun vi, vi estos ludilo de la riveraj ondoj. Ili disbatos vin kontraŭ la bordon...

En la vivo estas multaj homoj, kiuj ne komprenas la plej ordinaraĵajn verojn kaj nur proprigas al si fremdajn laŭrojn.

RIVERO KAJ TORENTO

La rivero diris al la torenteto:

— Kial vi rapidas al la valo, traŝoviĝante inter la rokoj, tra ombroj kaj ĉiam kuran-te sur la kamparo...

— Mi rapidas — respondis la torenteto — ĉar mi estas juna... Kiam mi fariĝos granda, mi ankaŭ kiel vi fluos trankvile...

NEFORGESEBLA RENKONTO

Rakonto de NIKOLAJ ZIDAROV

Estis la Nova Jaro de 1949.

En la salono, ornamita per verda tolo, estis silente — kvazaŭ en arbaro antaŭ sunleviĝo, sur kies branĉoj nur post momento ekkantos najtingaloj kaj aliaj birdoj. Ekstere zefiro skuetis la branĉetojn de la pinoj. Ili moviĝis, frapetis sur la fenestrojn de la palaco «Vranja», kvazaŭ flustris: «Bonvenon!» La etaj gastoj, sur kies brustoj brilis helruĝaj kravatoj, emociiĝis. Kiel senpacience batis iliaj koroj! Ĉu ili povos rakonti ĉion? Ĉar li, la karega homo, povus eniri post momento en la salanon!

Sed ĉu oni povas malbriligi la sunon, igi la venton ne skueti la suprojn de la arboj, malkantigi la birdojn? La kanto jam impetis. Kiu rezistos? La akordiono ekvibris kaj ĉiuj ekkantis. Libera kaj neretenebla kanto! Ekfloris — oni povus diri — la sunfloroj sur la tapiŝoj, ekstremis la verdaj kurtenoj. La pordo malrapide malfermiĝis. Jen estas li mem — la karega Georgi Dimitrov! Ekeĥis krio de ĵura — kvazaŭ la vento enpuŝiĝis en la centjaraĵn arbarojn de la Bal-

LA PREMIO

Du ĉevaloj kun peno tiris la pezan veturilon sur la kruta vojo. La veturigisto frapis la lacigitajn ĉevalojn per longa vipa. De tempo al tempo li kriis al ili:

—Nu... Tiru!... Ankoraŭ mallonga vojo restas... Hot!...

Li plu vapis la ĉevalojn kaj abunde ŝvitiĝis ilin. La ĉevaloj interplektis gambojn kaj kun lastaj fortoj tiris la veturilon.

Tiam la veturigisto vapis ankoraŭ unu fojon la ĉevalojn kaj kriis:

— Tiru pli forte, por ke ni supreniru la supron!... Kiam ni atingos tien, mi donos al vi grandan premion: mi aĉetos al vi novan vipon!...

ERINACO KAJ MUSTELO

Foje la erinaco kaj la mustelo sidis interparolante sub bela foliorika verda arbus-to. La suno brilis supre sur la ĉielo kaj plenigis ĉies korojn je serena ĝojo.

Ambaŭ parolis pri la herooĵoj de la leono, kiu estas subiginta al si multajn regnojn kaj popolojn. La mustelo estis ravita kaj laŭdis la leonan heroecon.

Tiam la erinaco enpensiĝis kaj saĝe respondis:

— Pli multe da gloro meritas tiu, kiu forviŝis du larmojn, ol tiu, kiu igis elverŝiĝi torentoj da sango...

kano. Neretenebla hurao! La amata Georgi Dimitrov, fortika kaj ridetanta, proksimiĝis, manpreme salutis la infanojn. Unu post la alia ili prenis la patran manon, kaj en ilin kvazaŭ transiĝis la forto de tiu potenca homo. El la vicoj elkuris emociiĝinta knabo kun gratulbranĉeto en mano kaj anhelante, komencis reciti novjarajn bondezirojn. Alia enmanigis al li albumon, tria — donacon, ellaboritan de rondo...

Invitinte la infanojn sidiĝi, Georgi Dimitrov ekridetis varme kaj demandis:

— Kaj ĉu vi scias prezenti vin?

La etaj gastoj stariĝis unu post alia antaŭ la karega dommastro kaj komencis ĉirpi kvazaŭ ĵalaŭdoj. Ĉiuj kantis bonege.

— Mi ĝojegas — reparolis Dimitrov, — ke vi ĉiuj estas distingiĝintoj. Mi akceptas viajn salutojn kaj bondezirojn kiel salutojn kaj bondezirojn, kiujn sendas al mi ĉiuj kuraj junpioniroj el urboj kaj vilaĝoj. Mi ankaŭ transdonas per vi miajn plej koraĵajn bondezirojn al ĉiuj junpioniroj en nia lando.

Georgi Dimtirov karese ekrigardis la infanojn. Li rakontis al ili pri la gloroplena septembra ribelo en 1923 jaro, pri la heroeca batalo de la popolo kontraŭ la faŝismo, pri la nova venkoplena Septembro en 1944 jaro. Li klarigis la signifon de la vorto «junpioniro».

— Tio ĉi estas tre honora titolo. Sed ĝi ankaŭ trege devigas. Ĝi postulas de vi lernadi kaj kunporti amon al la popolo kaj nia patrolando!

La etaj gastoj starigis multajn demandojn. Georgi Dimitrov respondis al ĉiu. Li rakontis

pri la feliĉa vivo de la sovetaj pioniroj, pri Moskvo kaj Artek, pri la malfeliĉa vivo de la infanoj en la kapitalismaj landoj. Adiaŭante li konsilis al la junpioniroj lernadi bonege, laboradi obstine, esti fidele al la popolo kaj al la patrio, vivi en kamaradeco kun la sovetaj pioniroj kaj kun la infanoj de la aliaj landoj, batali por la afero de la socialismo...

La infanoj disiĝis kun Georgi Dimitrov, ĝojaj kaj feliĉaj.

Tradukis: M. L.

TIO RESTU INTER NI!

rakonto de DIMITR BORISOV

Aŭtuno. La hodiaŭa dimanĉo estas unu el tiuj belaj sunaj tagoj, kiuj invitas la urbanojn eliri el siaj hejmoj por promenadi.

Mi sidas sur benko en la Parko de la Libereco, rigardante la promenantojn.

Subite mia atento estis altirita de du virinoj, pasantaj preter mi, kiuj interparolis kun entuziasmo, laŭte kaj samtempe, jes — samtempe!... Eble ili multe pli ŝatis la minutojn mem de la babilado ol perdi tempon por tolereme aŭskulti unu la alian... Ĉu ili sukcesis interkompreni sin, mi tion ne povas scii, sed ili donis al mi la ideon ŝerdi per la frazo: «Tio restu nur inter ni!»

Estis dekunua horo antaŭtagmeze, kiam mi vidis mian najbarinon Dimitrina, irantan al mi.

— Jen oportuna okazo — ekpensis mi, kaj kiam ŝi proksimiĝis al mi, mi salutis ŝin:

— Bonan tagon, kamaradino! Ĉu vi deziras sidiĝi ĉe min kaj iomete ripozi?

— Dankon! — ŝi respondis. — Mi rapidas; mi serĉas mian infaneton Stefĉjo, kiu ludis apud mi, kaj nun mi ne povas lin trovi.

Dirinte tion, ŝi provis liberiĝi de mi, sed mi demandis ŝin:

— Ĉu vi scias pro kio do la geedzoj Pacov interkverelis?

— Sed kio do okazis? Mi aŭdis nenion pri ili, — demandis ŝi scivoleme.

— Oni diras, ke ili interŝanĝis ofendajn vortojn tiel laŭte, ke eĉ iliaj najbaroj aŭdis tion. Sed mi petas vin, tio restu nur inter ni! Estas ja malinde klaĉi kontraŭ homoj...

— Sed tio ne estas ebla! Ĝis nun mi ja aŭdis nenian malbonan vorteton pri ili. Kia diablo eniris en ilian domon! — emociite respondis Dimitrina.

— Tion mi ne scias, sed laŭ mi, verŝajne estas iuj bagatelaj.

— Kaj... Dio gardu, se ili jam sentas sin fremdaj unu al la alia kaj ne povas sin toleri plu — kaj mi ĵetis rigardon al ŝia tre larĝe dekoltita kolo en kies profundo montriĝis la ĉarmo de tiu juna kaj bela virino...

Adiaŭinte kaj irinte 10-20 paŝojn, ŝi renkontis sian najbarinon Angelina.

— Kara franjo, mi tre ĝojas renkonti vin. Ĉu vi aŭdis ion pri skandalo en la familio Pacov?

— Kia skandalo?! Mi ne komprenas vin... — respondis Angelina.

— Mi ankaŭ ne supozis, sed jen la fakto: Ofte Pacov, la edzo, revenis hejmen tre malfrue. Iun vesperon lia edzino renkontis lin kun telero en la mano, kiun ŝi ĵetis sur lin. Li ekĝemis pro doloro kaj okazis granda skandalo...

— Kiel do estas eble?... Ili vivas tiel kviete, ke aliuloj eĉ envidus ilian feliĉon!

— Vi estas tre naiva, franjo mia — diris Dimitrina. — La homoj scias kiel kaŝi sian intiman vivon. Tiu skandalo finiĝos nepre per eksedziĝo...

— Kia do estas la kaŭzo?

— Mi tion ne scias. Eble ia historio pri adolto de la edzo... Sed tio restu nur inter ni! Ha! Mi estis forgesonta, ĉu vi vidis ie mian infanon?

— Mi vidis lin ĉe la luliloj...

Mia naiva frazo «Tio restu nur inter ni!» cirkulante de buŝo al buŝo kaŭzis kelkajn m'agrablaĵojn... Ekzemple, nia heroino Dimitrina longe serĉis sian infaneton; al alia virino la manĝaĵo restis sen akvo sur la

forno, sed spite ĉion, la famo kŭris, eĉ kuregis tra la tuta urbo.

Tiun vesperon, je la dekoka horo denove mi renkontis Dimitrina, la saman, al kiu mi diris tion pri la familio Pacov.

— He, kian novaĵon vi portas? — mi demandis ŝin.

— Mirakloj okazas sur la tero, strangaj mirakloj — ekkriis Dimitrina, kaj daŭrigis:

— Pacov — la edzo — amindumis la amikindon de sia edzino, ŝin certigante, ke li forlasos sian edzinon por preni ŝin, la matutindon. Pro iliaj intimaj rilatoj, ŝi fariĝis patrino de unujara infano. La patrino-amatino, kompreninte, ke li trompas ŝin, plendis ĉe la tribunalo kaj oni kondamnis lin por zorgi pri la vivtenado de la infano. Tion eksciis lia edzino kaj kiam iun vesperon ŝi lavis telerojn, okazis la skandalo. La edzino rimarkis sian edzon, enirantan la hejmon senbrue, kaj konstatis, ke li odoras je parfumo... Ŝi tuj demandis lin kial li

revenas tiel malfrue kaj kiel vera ŝtelisto... Li klarigis, ke okazis kunveno, kiun li partoprenis. La edzino ekkoleris pro lia evidenta mensogo kaj denove demandis:

— Kiu estis la preleginto, kiu aspergis vin per bonodora fluidaĵo?

Kaj en incitita stato ŝi jetis teleron, kiu trafis lian kapon. Li falis teren en senkonscio kaj oni forveturigis lin en la hospitalon. Ŝi jam estas doninta petskribon pri ekседziĝo. Mi aŭdis tion de kredinda fonto...

Ni adiaŭis unu la alian, kaj mi, promenante sur la strato, komencis pripensi: ĉu tio estas vera aŭ rezulto de mia ŝerco. Kaj mi mem komencis jam kredi tion kiel verajon...

Subite, por mia plej granda surprizo, mi renkontis geedzojn Pacov, elirantajn brak' sub brake el la kvartala kinejo kaj gaje interparolante...

ESPERANTISTA KULTURDOMO — KASTELO GRESILLON

Antaŭ ses jaroj francaj esperantistoj aĉetis en la bela regiono de «Loire Kasteloj» la bienon «Gresillon». En la kastelo, meze de bela parko, kun lageto, banejo kaj boskoj, la esperantistoj el la tuta mondo ripozas, sentante sin kvazaŭ en sia hejmo.

La kulturdomo ofertas al siaj gastoj ne nur modernan komforton, distron, ludojn, dancojn, tuttagajn ekskursojn al proksimaj lokoj, sed ankaŭ kulturajn okupojn: kursojn de esperanto, kursojn de franca lingvo kaj literatursciencajn prelegojn en modela esperanto.

Dum la ferioj 1958 la somerumantoj aŭskultos la sekvantajn prelegojn de eminentaj esperantistoj: «La sciencistoj kaj la socio», «La sciencistoj kaj esperanto», «Scienco kaj fakaj terminaroj en esperanto» k.a.

La samideanoj el la tuta mondo estas petataj partopreni la internaciajn feriojn en Gresillon. Kontraŭ 1 respondkuponon ĉiu povas ricevi detalajn informojn, skribante al: Esperantista kulturdomo — Kastelo Gresillon, Bange (M. et M.) Francio.

ATENTIGO AL LA KORESPONDEMAJ BULGAROJ

La iniciatanto de aperigota gazeto «Leteroj el Praha» samideano Jojko Stanek petas nin sciigi la jenon:

Juĝante miskompreni pri nia projektita eldono, kies nomo komenciĝas per «Leteroj», multaj bulgaraj samideanoj komprenis, ke la afero temas pri korespondado, kaj aliĝis. Ni dankas pri ilia intereso, tamen

ni atentigas la bulgarajn samideanojn, ke «Leteroj el Praha» estas gazeto priskribanta la kulturan vivon en Ĉeĥoslovakio.

DEZIRAS KORESPONDI

Vera Miziĉ, oficistino, USSR, Latvia SSR, Riga, Maskajas iela 24-3.

Jmants Podraĉnieks, inĝeniero, USSR, Latv. SSR, Riga, Lenina iela 83-18.

Geinstruistoj Konoreva Kapitalina Egorovna, Stepanova Klavdja Grigorevna, Fomina Elisaveta Fedorovna, Umerenkov Miron Ivanoviĉ, USSR, Kurskaja oblast, st. Zolotuĥino, Novo-Spasskaja Srednaja Ŝkola.

Staniulyte Audrone, studentino, USSR, Litovio, Kaunas 18, Gudyno 17.

Jozefo Kovacs, Telek 18, Bekcsaba VI, Hungario, interesiĝas pri la vivo de bulgaraj oficistoj, pri bulgaraj filmoj kaj poŝtmarkoj.

Walter Hübler, Karl-Marx-Stadt C I, Leninstr. 5, DDR, pri profesiaj edukaj temoj.

J. Ojalo, Tallinn, P.K. 426, Estona SSR, pri nutrado kaj ĝeneralaj temoj.

Ŭlo Tuulik, str. Lenini 9, Kingisepa, Estona SSR, USSR, lernanto en XI klaso, kun bulgaraj esperantistoj pri sporto, literaturo kaj historio.

Diversaĝaj gekursanoj volas korespondi kun ĉiuj landoj — Esperanto-kurso, Polski Trambeš, Tirnovsko, Bulgario.

Steponas Višniauskas, Pabirzes, MTS, Birzy rajonas, Litova, SSR, USSR.

Fino Monique Herve, 27 rue Maxim Bourdon, Saint-Pierre-des-Corps, Indre-et-Loire, Francio, kun bulgaraj fraŭloj 18—35-jaraj.

Nina Gorskaja, Pedagogia Instituto, Jaroslavl, USSR, studentino de kvara kurso, pri literaturo kaj kulturaj temoj.

G. A. Kolobov, Borovskoe ŝose 9, kv. 454, Moskva V-261, pri filatelio, interŝanĝas poŝtmarkojn.

30 gekursanoj en Instituto de alilandaj lingvoj pri vivo de alilanda junularo. Skribu amase. Ni ŝatas ricevi esperantajn propagandilojn en angla, germana kaj franca lingvoj. Esperanto-krujok, Institut Inostran-nih Jazikov, Gorjkij, USSR.

Sider Denev Pavlov, teknikisto, vil. Pol. Trambeŝ, Tirnovsko, Bulgario, kun gesamideanoj el ĉiuj landoj.

RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ

NUNTEMPA BULGARIO, n-ro 4, Sofia, str. Ĥevski 1.

INTERNACIA JURNALISTO, n-ro 5-6, organo de Tutmonda esperantista jurnalista asocio (TEJA), redaktoro Ivan Keremidĉiev, bul. Ĥr. Botev 98, Sofia 2, Bulgario.

GRAJNOJ EN VENTO, n-ro 1, eldonata de Esperanto-rondo 11, vil. Polski Trambeŝ, Tirnovsko, Bulgario.

GRAVA POR ĈIU ESPERANTISTO

Ĉiu esperantisto, malnova aŭ nova, povas pliriĉigi siajn konojn de esperanto kaj fariĝi modela kaj perfekta esperantisto, aliĝante al la kurso de esperanto por progresintoj, organizita de Korespondaj kursoj ĉe entrepreno «Vsestranni uslugi» — Sofio. La kurso konsistas el ok kajeroj, kun detalaj klarigoj pri la esperanta sintakso, leĝaĵoj, adresoj de alilandaj geeseperantistoj, k.a. Aŭtoroj de la kajeroj estas Kunĉo Valev kaj Miĥail Langov, kaj redaktoro — Ivan Sarafov. Ĉiumonate formiĝas novaj grupoj de gekursanoj.

Esperantistoj, perfektigu en esperanto, fariĝante kursanoj de la kurso por progresintoj ĉe «Korespondaj kursoj»! Petu detalajn informojn pri aliĝo al adreso: P. K. 224 — Esperanto, Sofia, bul. Dondukov 51, et. I, tel. 7-08-08.

PAROLO DE LA REDAKCIO

Post longa kaj intensa klopodado antaŭ ni estas la unua duobla numero de «Bulgara esperantisto» en tipografia presita formo. Nun ni havas eblon presi pli varian kaj pli ampleksan materialon: literaturaĵojn, kantojn, kliŝojn. Pro tio estas necesa la partopreno de kiom eble pli la verkistoj kaj korespondantoj. Ju pli da samideanoj partoprenos en la enhavo de «Bulgara esperantisto», des pli nia organo estos varia kaj riĉenhava.

La redakcio apelacias al ĉiuj esperanto-verkistoj mobilizi sin kaj sendi al ni originale verkitajn versaĵojn, rakontojn, skizojn, humoraĵojn, satiraĵojn, raportaĵojn ktp. Ni danke akceptas ankaŭ tradukaĵojn de bulgaraj aŭtoroj. Ni kore dankas al samideanoj J. Lubjanovskij el Ostogoĵek (U.S.S.R.), al Sprostranov, S. Simeonov, C. Murgin kaj M. Langov el Sofio, al P. Arnau-dov el Pazarĝik kaj al ĉiuj aliaj, kiuj bonvolis sendi al ni literaturaĵojn aŭ alian materialon por publikigo.

Ni atentigas la kunlaborantojn, ke la redakcio ne disponas salajratajn oficistojn, ke la anoj de la redakcia komitato oferas sian liberan tempon por liveri al la abonantoj belaspektan kaj riĉenhavan kajeron de B. E. Jen pro kio ni petas denove, ke oni skribu tre klare la materialojn, kun granda marĝeno kaj sufiĉa interlinia spaco. Ni akceptas materialojn nur en esperanto.

Ni denove atentigas la societojn kaj apartajn esperantistojn pri varbado de novaj abonantoj. Ĉiu helpu laŭ sia eblo la redakcion en nia komuna afero.

Redaktas komitato. Ĉefredaktoro Violin Oljanov
Adreso de la redakcio: P.K. 66, Sofia, Bulgario